l'esperanto

SOMMARIO

Unuaj impresoj pri Bolonjo . . . . . p. 17

Kongresa bulteno . . . . . » 18

Via Tribuno . . . . . » 19

Pri la Ĝemelaj vortoj . . . . . » 21

Kvina nacia kunveno de grupestroj . . . » 24

Notiziario ISKE . . . . . » 25

Rassegna della stampa . . . . . » 27

Vita esperantista . . . . . » 29

Vita dei Gruppi . . . . . » 30

Internaciaj Feriaj Semajnoj . . . . 3ª di cop.

NUMERO

NUOVA SERIE **32**

UN NUMERO L. 50

« L'ESPERANTO »

Abbonamento annuo L. 400 - Abono por eksterlando L. 450 (5 anglajn sil.) - 10 abbonamenti omaggio L. 300 caduno - Un numero separato L. 60 - Gratis ai soci individuali - Sconto ai soci di gruppo (vedi tabella quote sociali) - Versamenti su Conto Corr. Post. n. 2/37768, della Federazione Esperantista Italiana, Via Saluzzo 44, Torino - Dirett. respons. Clelia Conterno Guglielminetti - Autorizzazione n. 526 del 7-2-1950, del Tribunale di Torino.

Stampa: Tipografia L'IMPRONTA - Via O. Morgari, 23 - Torino.

NOTIZIARIO INTERNAZIONALE

Direzione e Redazione: TORINO - Via Spallanzani, 15
Pubblicazione a cura della F.E.I. in collaborazione con la
Universala Esperanto Asocio (Londra).

ESCE OGNI MESE
E' REDATTO IN ITALIANO con riassunti in esperanto.

RIPORTA LE NOTIZIE DEL MONDO
CHE RIGUARDANO COMUNQUE L'ESPERANTO.

Abbonamento: **L. 500 annue**, da versarsi sul c/c postale n. 2/37768, intestato alla F.E.I.

QUESTO è il miglior momento per abbonarsi!

L'ECO DELLA STAMPA

Ufficio di ritagli da giornali e riviste
Fondato nel 1901
Direttore **UMBERTO FRUGIUELE**

Via Campagnori n. 18 - MILANO - Telefono 53.335
Casella postale 9'8 Telegr ECO STAMPA C. C. I. A. Milano 77394

Anno 33 - N. 2 MARZO-APRILE 1955 Nuova Serie n. 32

L'ESPERANTO

Periodico bimestrale d'informazioni e commenti

Organo ufficiale della Federazione Esperantista Italiana

Unuaj impresoj pri Bolonjo

de MASON STUDDARD

Al sunsopira spirito alveno en Bolonjo estis kiel varma kareso de patrino. La brunruĝaj tonoj de la grandaĝaj muroj sorbas la brilon de la tago kaj ĝin transformas en delikatajn nuancojn de ĉefverko pentra. Dun la tuta longa tago la oktobra suno verŝas siajn radiojn en la urbon kreante spirhaltigajn efikojn de lumo-ombro, precipe en la malnovaj stratoj kie dikaj muroj masivas pezante sur kolonoj fortaj.

Bolonjo estas antaŭ ĉio urbo de palacoj. Ĉiupaŝe riveliĝas novaj beloj de konstrua arto kaj la mozaiko de la jaroj trovas sian esprimon en la interimplikiĝo de stiloj plej diversaj. Ekvilibro en malegalo, harmonio en kontrasto.

Situante ĉe la deklivaj ekstremoj de Apeninoj sur granda ebenaĵo, Bolonjo kun sia duonmiliona loĝantaro estas natura trafika centro inter norda kaj suda Italujo. Konsulto ĉe la mapo montras kiel la trafikaj arterioj konverĝas al ĉi tiu punkto. Sekvo de tio estas, ke ĉi tiu antikva urbo etruska akiris en tempo moderna karakteron kosmopolitan, kiu tamen ne detruis la intimon kaj gajan kamaradecon de ĝia popolo.

Post la unua impreso de antikva tradicio kaj grandaĝa kulturo la plej forta impreso estas de la etoso de gajo kaj optimo en la vivo surstrata. Komprenu bone: kvankam la suno ne domaĝas sian vivodonan varmon la malnovaj arkitektoj de Bolonjo faris tre prudentan antaŭzorgon por ke la urbanoj ne havu ĝenon de tio. En ĉiuj stratoj la trotuaroj sin kaŝas en agrabla ombro de grandegaj portikoj kei piedirantoj sekure iras sian vojon, butikumas, aŭ simple — kaj saĝe — sin lokas ĉe unu el la multaj tabletoj kaj en malurĝo rigardas al la «mondo kaj lia edzino», samtempe prave sin senigante de soifo... Kaj sub ĉi tiuj masivaj arkadoj vidiĝas la apoteozo de eleganto. La fenestroj de modaj butikoj stimulas en la preterpasanto nerezisteblan frenezeton de elspezemo! Tiel rafinitaj estas la varoj elmontrataj.

Kaj la manĝaĵoj...! Kia sveniga sortimento de salivigaj varoj! De ĉiu koloro kaj formo, de ĉia konsisto kaj speco; por ĉia palato! Por orelo neitala la nuraj nomoj estas muziko dolĉa— tortellini, togliatelli, ravioli... Laŭdire en Italujo troviĝas 164 specoj de vinbero! Kia ambrozia elekto atendas la frandemulon!

Kiu frostotremas en ventovipita nordo, kiu sin ŝirmas per mantelo pluva kaj ombrelo, kiu sospiras al suno kaj varmo... venu, nepre venu al Bolonjo!

(el «Esperanto», nov. 1954).

40-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

JUBILEA KONGRESO

31 Julio - 6 Aûgusto 1955

Adreso: ĉ C.I.T., Piazza Nettuno 2, BOLOGNA, Italujo.
Banko: Banco di Napoli, Bologna, konto 2824.
Ĝiro: Grupo «A. Tellini» Medaglie d'Oro 3, N. 8/20620.
N-roj 4-5 Februaro-Marto 1955

OFICIALAJ KOMUNIKOJ

Honora Protektanto: La L.K.K. havas la honoron anonci, ke akceptis esti Honora Protektanto de la Jubilea Kongreso S-ro D-ro Luigi EINAUDI, Prezidanto de Italujo.

Peto al Pioniroj: La L.K.K. deziras havi la nomojn kaj koncernajn detalojn de kongresanoj de la Jubilea Kongreso, kiuj ĉeestis ankaŭ la Unuan Kongreson en Boulogne-sur-Mer, Francujo.

Adreso de la Kongreso: Poŝtaĵoj por la kongreso nepre portu la nomon de la kongreso. Alvenas leteroj adresitaj nur al «CIT» kaj tiu instanco malfermas ilin. La kongresa oficejo estas en la sidejo de CIT (Compagnia Italiana Turismo).

Kongresejo: La ĉefa kongresa ejo de la Jubilea Kongreso estos la Universitato de Bologna.

Kotizoj: Post 31 marto la kotizoj plialtiĝas. Bonvolu konsulti la tarifon. Aliĝiloj haveblaj ĉe Landaj Asocioj de UEA kaj la Kongresa Oficejo (adreso ĉisupre). En la adreso nepre citu la nomon «40-a Universala Kongreso de Esperanto».

Limdato: Kiel kutime, la limdato por aliĝo estas la 30-a de junio. Aliĝiloj devas esti ĉe la L.K.K. aŭ ĉe la Perantoj je tiu dato. En julio la administrantoj FERMAS LA KONTOJN por ordigi la kalkulojn necesajn je kontrolo kiam alvenas la kongresanoj. Pagojn kiuj venas post 30 junio, ni skribas en «ŝvebantan» konton kaj redonas al la koncernaj personoj je alveno. Sendante monon zorgu do ke ĝi atingos la L.K.K. antaŭ la fino de junio. L.K.K. ne povas fari esceptojn de tiu praktiko.

Gazetara Servo: Oficialaj instancoj, kiuj deziros ricevi dum la kongreso la bultenojn de la Gazetara Servo, bonvolu kiel eble plej baldaŭ sciigi tion al la L.K.K. por ke ĝi faru la necesajn antaŭ-zorgojn. Skribu adreson klare kaj indiku, ĉu oni deziras ilin a) ĉiutage, b) post la kongreso aŭ, c) iu persono (nomu lin) mem prenos ilin en la Gazetara Servo.

Infana Programo: Al ĉiu kongresano ĝis la aĝo de 15 jaroj la L.K.K. sendis specialaa cirkuleron koncerne apartan aranĝon. Laŭ la respondoj la L.K.K. agos.

Junulara Programo: La L. K.K. projektas specialajn programojn en la vesperoj de dimanĉo, merkredo kaj ĵaŭdo de la kongresa semajno speciale por la junularo en la aĝgrupo 16-20 jaroj (aŭ iom pli). Dancado kaj distraĵoj. Skribu al L.K.K. ĉu vi havas intereson por tio.

Statistiko (*ĝis* 28 *feb.*): Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrio 18, Belgujo 12, Brazilo 3, Britujo 75, Danujo 24, Finnujo 27, FRANCUJO 170, Germanujo 83, Hispanujo 5, ITALUJO 208, Izraelo 1, Japanujo 1, Jugoslavio 41, Kubo 1, Maroko 18, NEDERLANDO 113, Norvegujo 17, Novzelando 1, Portugalujo 6, Sarlando 1, Sudafriko 1, Svedujo 73, Svislando 24, Usono 10. Sumo el 27 landoj 937. Interesaj ciferoj: Nemembroj de UEA 21,9%; Instruistoj 18%; personoj sub 21 jaroj 7%.

Nome de L.K.K.
MASON STUTTARD, K.K.S.

NI ALDONAS: RAPIDU ALIĜI, ĈAR:
1) ANTAŬ LA 31.a DE MARTO VI ĈUOS RABATON.
2) LA EKSTERORDINARE JAM GRANDA NUMERO DA ALIĜOJ SUPOZIGAS RELATIVE BALDAŬAN ELĈERPIĜON DE LOKOJ.

Apartaj informoj pri la Kongreso

Ĉiu aliĝinto jam ricevis bultenojn pri loĝiga servo kaj pri ekskursa servo.

Ni resumas la ĉefajn instrukciojn, sed la aliĝintoj atente tralegu la presaĵojn kiujn ili ricevis.

LOĜIGA SERVO - Jam estas preta ĝenerala tabelo de la hotel-prezoj, havebla de kongres-sekretariejo. Kiu vojaĝos per karavano, mendu al la sama instanco al kiu li pagas; konsultu la karavanestron. Kiu veturos sola, povas antaŭmendi tra oficejoj de CIT en sia lando, aldonante la koncernajn Mendilojn (ricevendaj post aliĝo).

Mendanto devas ankaŭ pagi makleron je liroj 400 por ĉiu lito mendata. Limdato por mendoj: *7.an de junio* 1955.

EKSKURSA SERVO.

1.an de Aŭgusto - *Vizito de Bologna* per aŭtobuso, trihora; limigitaj lokoj, do mendu frue. Prezo it. l. 250.

4.an de Aŭgusto - *Tuttagaj ekskursoj* al: *Padova kaj Venezia*, per aŭtobuso kaj, en Venezia, ŝipeto; ĉio entenata, it. l. 2.850.

Ravenna, per aŭtobuso; it. l. 2.350.

Adria Maro, urbo Rimini, respubliko S. Marino, per trajno kaj, al S. Marino, libervole per aŭtobuso, it. l. 2.950.

POSTKONGRESAJ EKSKURSOJ.

7.an-12.an de aŭgusto: *Bologna, Perugia, Assisi, Roma, Napoli, Cassino, Roma, Orvieto, Chianciano, Siena, Firenze, Bologna;* per aŭtobuso, tranoktoj en dulitaj ĉambroj, ĉio entenata: it. l. 29.900. Por ricevi unulitan ĉambron, oni aldonos ĉiufoje it. l.jn 400.

6.an-13.an de aŭgusto: *Bologna, Firenze, Perugia, Assisi, Roma, Napoli, Cassino, Roma, Chianciano, Firenze, Bologna.* Per aŭtobuso, tranoktoj en dulitaj ĉambroj (por unulita oni pagu suplementon ĉiufoje it. l.jn 440): ĉio entenata, it. l. 39.800.

La du Postkongresajn ekskursojn povos partopreni nur 200 personoj entute. La tri tuttagajn ekskursojn povos partopreni po 600 (kaj al Rimini 700) personoj.

VIA TRIBUNO

Por la 40a Universala Kongreso de Esperanto

Ĉi-jare, al Bologna Urbo, estos rezervata la granda honoro gastigi nian Jubilean Kongreson. La italaj gesamideanoj estas fieraj de tiu ĉi honora tasko kaj la pioniro de iama Esperanta movado en Bologna, Dokt-ro Tellini, el la Udinea Tombejo kie li ripozas, benos la L.K.K. kaj ĉiujn kunlaborantojn.

Bedaŭrinde, ĝis nun, malgraŭ la propagando farita de niaj eminentuloj pere de tag-ĵurnaloj, radio elsendoj, flugfolioj k.t.p. nur malmultaj Italoj konas la taskon rezervitan al nia movado kaj tiun ĉi aserton mi pruvas pere de malgranda epizodo:

Vojaĝante per vagonaro de Udine al Torino, kiam la trajno atingis Milanon, en la kupeon envenis maljuna sinjoro; li metis la valizon sur la reton, poste li sidiĝis kaj malfermis la taggazeton; post kelkaj minutoj, anstataŭ daŭrigi la legadon, li komencis pridiskuti kun mi la forveturan malfruiĝon de la vagonaro kaj kiam li ekvidis la verdan steleton kiun mi ĉiam portas al la butontruo, li demandis la signifon de ĝi kaj mi, ĝentile, respondis: Esperanto! «Esperanto? ĉu estas nova trinkaĵo?». Mi pensis, ke li volis moki min, kaj senhezite mi tuj respondis: jes, estas nova trinkaĵo, sed ne «Koka Kola» (Coca Cola):

ĝi estas minerala akvo « San Pellegrino » kaj per la fingro mi montris al li grandan reklamilon kiu pendis sur la muro de la stacidomo, sur kiu oni vidas grandan botelon kun kvinpinta steleto. La ĉeestantoj ekridis kaj komentis la spritaĵon, sed la maljuna sinjoro, iom humile, diris: « Mi petos de vi pardonon, sed mi ne volis moki viu, tute ne, mi nur deziras informojn pri la signifo de la vorto Esperanto ».

Laŭ mia kapablo mi klarigis al li la signifon kaj la taskon rezervitan al nia movado kaj samtempe mi donis al li propagandilon « L'Esperanto in un foglio » kiun mi ĉiam kunportas en la valizo. Poste, unu el la ĉeestantoj sin turnis al mi dirinte: « Mi tre simpatias por via movado kaj ankaŭ mi subskribis peticion al UNESKO ».

Ŝajnis al mi ke tiu okazo estis favora, por daŭrigi la propagandon dum la tuta vojaĝo ĝis Torino, kaj por pruvi ke Esperanto taŭgas, mi rakontis malgrandajn epizodojn okazintajn dum la Universalaj Kongresoj.

Ĉiuj propagand-metodoj estas bonaj, sed laŭ mia modesta opinio unu el la plej efikaj estas la eldono de poŝt-markoj kun esperanta teksto, tute same kiel oni jam faris: Aŭstrujo, Brazilo, Jugoslavujo, Bulgarujo k. t. p.

La poŝt - markoj ne interesas nur la kolektantojn, sed ankaŭ la plej indiferentan el la komunaj homoj; ili ne estas propagand - artikolo, kiun ne ĉiuj personoj emas legi, ĉar, en Italujo, la personoj ne estas inklinaj al legado de ĉio kio ne rilatas sporton (legu futbalon); anstataŭ, scivolemo devigas ilin rigardi la bildon reproduktitan sur la poŝtmarkoj.

Konklude: mi turnas min al niaj eminentuloj L.K.K., F.E.I. k.t.p., petante ilin kontaktiĝi kun la Ministro de Poŝtoj petante la eldonon de minimune unu aŭ pli da serioj de esperantaj poŝtmarkoj okaze de nia Jubilea Kongreso; se la provo sukcesos, la propagando ricevos grandan antaŭpuŝon kaj... la poŝta administracio plibonigos sian financan staton.

Estimata amiko: ĉu vi vere kredas, ke ni ne pensis pri tio?... Kaj, ke, pensinte pri tio, ni nenion faris?...

"Eternaj komencantoj"

Mi riferisco a quanto è stato pubblicato in questa rubrica, nel n. 27, per fare qualche considerazione sul problema.

1. - L'esperantista può essere « utilizzato » dal movimento solo quando conosce, in proporzione alla propria cultura, la lingua internazionale.

Chi conosce profondamente l'esperanto, lo apprezza e lo ama; la stima che egli ripone nella lingua internazionale lo terrà legato al movimento: i peggiori propagandisti dell'E. sono coloro che, non avendolo imparato, non hanno potuto apprezzarne il valore e hanno quindi abbandonato il movimento.

2. - Convinti della necessità di far conoscere l'E., si deve fare in modo che in un *unico* corso, l'allievo attinga una *buona* conoscenza della lingua. Un corso, anche elementare, che insegna la lingua *a metà*, è assolutamente inutile, anzi a mio avviso, dannoso. Occorre che i corsi *elementari* durino molto di più di quanto durano attualmente; non si deve dimenticare che l'E. non finisce in sedici regole ma è una lingua *completa*, con le proprie innumerevoli sfumature, come qualsiasi altra lingua nazionale.

3. - Al punto 2. si può obbiettare che un corso « lungo » può stancare allievi provocando l'abbandono. Giusto, ma coloro che per stanchezza non terminano un corso *elementare*, difficilmente parteciperanno ad un corso superiore.

D'altra parte i « Komencantoj » devono convincersi che l'E. non è una paralingua né un codice ad uso alberghiero: è una lingua che, pur richiedendo fatica minore rispetto alle lingue nazionali, deve essere studiata.

Inoltre, se si è ritenuto di progettare anche corsi superiori e di perfezionamento, significa che si era convinti dell'insufficienza del corso elementare.

4. - A favore del corso « lungo » vi è una ragione psicologica: l'alunno che abbandona questo corso è cosciente di averlo *interrotto*, mentre se ha terminato un corso « corto » e di conseguenza ha imparato poco, ritiene che l'E. sia un bluff o una truffa.

Non dobbiamo lasciare coloro che hanno partecipato ad un corso elementare, con la speranza di rivederlo nel corso superiore, ma invece dobbiamo trattenerlo il maggior tempo possibile per fare in modo che impari *meglio che può* la lingua: tanto meglio la conoscerà, tanto più facilmente lo ritroveremo, se non nel corso di perfezionamento, certamente nel movimento a collaborare ad una qualsiasi attività.

5. - Ritengo che i corsi elementari debbano anche favorire la conversazione: l'alunno che sa parlare ha maggior consapevolezza della funzionalità dell'Esperanto, di chi conosce solo, anche se meglio del primo, la grammatica e la sintassi.

6. - Per ultimo, occorre che il corso non esaurisca la propria funzione nel puro e semplice insegnamento della lingua, ma deve essere anche una scuola di informazioni, sulle possibilità offerte dal movimento, sulla storia della lingua internazionale, eccetera.

L'alunno alla fine del corso, oltre ad una buona preparazione grammaticale, deve possedere tutte quelle cognizioni che gli permetteranno di utilizzare *praticamente* l'Esperanto e gli daranno armi per *convincere* gli altri.

Per. Ind. P. MARELLI

Pri la Ĝemelaj Vortoj

Legante la artikolon de Marelli, en unu el la lastaj numeroj de « Esperanto », artikolo kiu temis pri la utileco de la afiksoj, mi konstatis ke la aŭtoro multe reliefigas la precizecon de nia lingvo. Mi volas ĉi tie aldoni ke, laŭ mi, unu el la kaŭzoj de la precizeco de Esperanto estas la ĝemelaj vortoj. Ili estas vortoj preskaŭ similaj, kiuj diferenciĝas nur per ŝanĝo de vokalo aŭ de konsonanto, kai kies senco ŝanĝas nur nuance.

Ĉi sekve mi skribos la plej gravajn el ili, kun la difino ĉerpita el « Plena Vortaro », kaj interparenteze la italan tradukon. En multaj kazoj, tiu ĉi estas la sama por la duopo aŭ triopo de ĝemelaj vortoj.

La listo celas konigi interesan flankon de nia lingvo al tiuj kiuj ne tro emas trafoliumi la vortaron.

AMO (*amore*) = Inklino al persono aŭ ideo.
AMORO (*amore*) = Seksa pasio aŭ volupta inklino al iu.

AGORDO (*accordo*) = Ĝusta rilato inter la diversaj sonoj de unu aŭ pluraj instrumentoj.
AKORDO (*accordo*) = Sameco de sentoj aŭ opinioj inter pluraj personoj.

ARTIKLO (*articolo*) = Speco de varo.
ARTIKOLO (*articolo*) = Vorteto uzata antaŭ substantivo por ĝin determini.

BUKO (*fibbia*) = Diversforma ringo, ordinare metala, kun movebla pinglo por fiksi zonon, rubandon.
BUKLO (*ricciolo*) = Spirale volviĝanta fasketo da haroj.

ĈAPO (*berretto*) = Kapvesto sen elstara rando kaj sen viziero.
ĈAPELO (*cappello*) = Kapvesto kun elstara ĉirkaŭrando.

DOMAĜO (*disgrazia*) = Bedaŭrindaĵo.
DAMAĜO (*disastro*) = Ruinigo, malfeliĉego.

FABELO (*fiaba*) = Fantazia rakonto pri mirigaj aventuroj.
FABLO (*favola*) = Fantazia rakonto, kies agantoj estas plej ofte bestoj aŭ senvivaj objektoj, kaj pruvanta moralan instruon.
FRONTO (*fronte*) = Antaŭa, laŭlarĝa, kvazaŭfrunta parto de objekto.
FRUNTO (*fronte*) = Superokula parto de la vizaĝo inter la tempioj.
FUNDO (*fondo*) = Plej profunda malsupra parto de io kava.
FONDO (*fondazione*) = Kreo, starigo de organizo.
FONO (*sfondo*) = Ebena aŭ ŝajne ebena parto, el kiu io elreliefiĝas.
GRAJNO (*granello*) = Malgranda semo, precipe de greno; sed ankaŭ grajno de aveno, rizo, k.t.p.
GRENO (*grano*) = Vegetaĵo el familio gramenacoj, kies semoj estas panigeblaj.
GENERALO (*generale*) = Militestro supera al kolonelo, kiu komandas brigadon, divizion.
ĜENERALA (*generale*) = Rilatanta senescepte al tuto.
ĜUSTA (*giusto*) = Severe konforma al la vero aŭ regulo.
JUSTA (*giusto*) = Konforma kun la leĝo kaj juro.
JAKO (*giacca*) = Ekstera vira vesto, malfermiĝanta ĉe la antaŭa parto, manikhava, kovranta la korpon ekde la ŝultroj ĝis proksimume la koksoj.
ĴAKO (*finanziera*) = Vira ceremonia vesto kovranta la supran parton de la korpo, de la ŝultroj preskaŭ ĝis la genuoj, kaj kiu havas baskojn ĉirkaŭantajn tute la korpon.
JURO (*diritto*) = Leĝoscienco.
ĴURO (*giuramento*) = Ago atesti jen Dion, jen iun aŭ ion, kiun oni opinias sankta, ke oni diras la veron aŭ plenumas promeson.
KARTO (*cartoncino*) = Kartonfolieto uzata kiel korespondilo aŭ kiel rekonilo.
ĈARTO (*contratto, documento*) = Dokumento konsentanta privilegion aŭ kontrakto fiksanta principojn por la rilatoj inter diversaj partoj de la socio.
KANO (*canna*) = Alta herbo el fam. gramenacoj, kies trunketoj iĝas per sekiĝado fortikaj, kaj estas uzataj kiel bastonoj.
ĈANO (*percussone o cane*) = Elstaranta peco de pafilo, per kiu oni frapas la kartoĉon por ĝin eksplodigi.
LANGO (*lingua*) = Movebla mola karna organo en la buŝo, servanta por gustumi kaj paroli.
LINGVO (*lingua*) = Sistemo da vortoj uzata de iu nacio aŭ gento por interkompreniĝo.
LETERO (*lettera*) = Skribaĵo, per kiu oni korespondas kun alia persono.
LITERO (*lettera*) = Ĉiu signo de la alfabeto uzata en skribado aŭ presado, por reprezenti la sonojn de la lingvo.
LECIONO (*lezione*) = Tio, kion instruisto lernigas al lernanto.
LEKCIO (*lezione*) = Universitata aŭ supera instrua parolado.
NEPO (*nipote*) = Filo de la filo aŭ filino rilate al ilia patro kaj patrino.
NEVO (*nipote*) = Filo de frato aŭ fratino.
NOBELO (*nobile*) = Homo, kiu pro sia familia deveno aŭ pro favore de regnestro ricevis apartajn privilegiojn.
NOBLA (*nobile*) = Havanta altajn kaj malvulgarajn moralajn kvalitojn.
NOMBRO (*numero*) = Nedifinita kvanto.
NUMERO (*numero*) = Cifero aŭ nombro montranta la vicon de iu objekto inter aliaj.
OFERI (*offrire*) = Disponigi al iu ion ne petitan.
OFERTI (*offrire*) = Proponi al iu varon aŭ servon aĉetotan.
ORDO (*ordine*) = Regula aranĝo de aferoj, laŭ kiu ili taŭge kaj oportune rilatas inter si.
ORDENO (*ordine*) = Honoriga societo, starigita de regnestro, por rekompenci la personan meriton.
ORDONO (*ordine*) = Esprimo de ies estra volo.

ORGANO (*organo*) = Aro da elementoj kunordigitaj en vivanta korpo por plenumi specialan funkcion.
ORGENO (*organo*) = Granda muzika blovinstrumento, kun tuboj kaj klavaro, uzata precipe en preĝejoj.

PAŜI (*camminare*) = Meti la piedojn alterne unu antaŭ alia por sin transloki.
PAŜI (*camminare*) = Meti la piedojn alterne unu antaŭ alia por sin transloko.

PESI (*pesare*) = Mezuri la pezon de objekto, komparante tiun pezon al alia pezo elektita kiel unuo.
PEZI (*pesare*) = Fari, pro la altiro de la tero, konstantan premon sur subtenantan objekton aŭ konstantan tiron sur pendigantan objekton.

PISTI (*pestare*) = Pecetigi aŭ pulvorigi per ripetitaj batoj.
PIŜTO (*pistone*) = Solida cilindro moviĝanta per stango interne de alia cilindro, repuŝante fluidaĵon aŭ puŝate de ĝi.

PLADO (*piatto*) = Granda telero, kiu servas por alporti sur la tablon la mangaĵojn disdonotajn al ĉiu manĝanto.
PLATO (*oggetto piatto*) = Objekto malpli dika ol larĝa kaj longa.

PLANDO (*pianta del piede*) = Suba parto de la piedo, kiu tuŝas la teron, kiam oni marŝas aŭ staras.
PLANTI (*piantare*) = Meti vegetaĵon en teron por ke ĝi plu kresku.

POLVO (*polvere*) = Subtilaj eretoj el tero, facile levataj de vento.
PULVO (*polvere*) = Eksplodema pulvoro el miksitaj salpetro, karbo kaj sulforo.
PULVORO (*polvere*) = Solida substanco dispecigita en subtilajn erojn.

PROVI (*provare*) = Apliki objekton al ĝia destino, por kontroli ĉu ĝi taŭgas.
PRUVI (*provare*) = Montri per rezonado aŭ fakto, ke io estas vera.

POENTO (*punto*) = Unuo de valoro ĉe ludoj.
PUNKTO (*punto*) = Malgranda signo farita per pinta ilo.
PUNTO (*merletto*) = Maldensa, artisme interspacigita teksaĵo.

SPIRITO (*spirito*) = Tuto de la homaj mensaj kapabloj.
SPRITA (*spiritoso, arguto*) = (iu) posedanta spiritan viglecon, kiu ebligas rapide trovi kaj originale esprimi neatenditan rilaton inter malsamaj objektoj aŭ malsamaj vortoj.

STATO (*stato*) = Maniero de estado.
ŜTATO (*stato*) = Regno konsiderata kiel registara kaj administracia organizo en ĝiaj rilatoj kun la regataj regnanoj.

ŜARGI (*caricare*) = Enmeti eksplodaĵon kaj pafaĵon en ian ajn pafilon. Provizi aparaton per la forto aŭ per io necesa por ĝia funkciado.
ŜARĜI (*caricare*) = Meti pezan portotaĵon sur iun.

TABELO (*tabella*) = Metoda aranĝo kaj ordigo de nomoj, nombroj aŭ signoj sur paperfolio tiamaniere, ke oni povas ĉirkaŭpreni la tuton per unu rigardo.
TABLO (*tavola*) = Meblo konsistanta el plato subportata de unu aŭ pluraj piedoj.
TABULO (*asse*) = Laŭlonge segita, ne tre dika, plata peco el ligno, aŭ samforma peco el alia materio.
TAVOLO (*strato*) = Maldika etenditaĵo da iu substanco sur io alia.

TRINKI (*bere*) = Gluti fluaĵon.
DRINKI (*bere smoderatamente*) = Malmodere trinki ebriigaĵon.

VELO (*vela*) = Granda forta tuko, fiksita ĉe la mastoj kaj streĉita por kapti la venton.
VUALO (*velo*) = Peco de ŝtofo aŭ tuko, uzata por kaŝi, kovri ion, precipe la vizaĝon de virinoj.

VESTI (*vestire*) = Kovri per ŝtofoj aŭ peltoj pli malpli alĝustigitaj al la korpo por ŝirmi kontraŭ malvarmo aŭ kaŝi nudecon.
VEŜTO (*panciotto*) = Senmanika vira brustvesto portata sub jako.

Kvina nacia kunveno en Bolonjo de la italaj grupestroj

(8an de majo 1955)

La kvar naciaj kunvenoj de la italaj grupestroj, ĝis nun okazintaj en Milano, dum aprilo, estis bone ŝatataj de nia Movado kaj ĉiam pli multnombre vizitataj. De jaro al jaro la dikutoj pri la bazaj problemoj de nia organizo harmonie plivastiĝis kun kreskanta partopreno de la grupoj kaj de niaj gvidantoj.

La supra konstato instigis Italan Esperantistan Junularon organizi la Kvinan tradician kunvenon de nia elito, por komuna studado de la temo: «La instruado de Esperanto. Problemoj, metodoj kaj efikoj». Kun la intenco kuraĝigi la partoprenon de la centr- kaj suditala (kiel ankaŭ de la insula) Movado, la manifestacio okazos ĉijare en granda fervoja centro de Mezitalujo, nome en nia jubilea kongresurbo Bolonjo, la 8.an de majo. Pro la feliĉa koincido de la kunveno kun la Bolonja Foiro, la veturantoj ĝuos eksterordinaran fervojrabaton de 25%.

Sendube, la tagordo altiros la atenton de la laboremaj esperantistoj kiuj sin dediĉas al la instruado de Esperanto kaj precipe de la esperantistaj profesiaj instruistoj, kiuj alportos siajn scion kaj sperton. La kursgvidanto de la lingvo internacia havas tute apartan personecon kompare kun la lingvo-instruantoj, ĝenerale. Li troviĝas ofte antaŭ publiko eterogena laŭ aĝo, studoj, profesioj kaj matureco. Li devas harmoniigi diversajn postulojn kaj pretendojn; li devas percepti la atmosferon de la kurso kaj krei taŭgajn lernkondiĉojn. Tamen, ankaŭ la lernantoj estas tre sentemaj: ili tuj komprenas ne nur la instrutalenton de la kursgvidanto, sed ankaŭ lian preparon, lian pli malpli profundan konon de la lingvo. La mastrado de tiuj faktoroj kaj la efektiva neriproĉebla lingvoscio estas nepraj kondiĉoj por la sukceso de nia kursvarbado.

Bedaŭrinde, en nia lando ne ekzistas veraj lernejoj por Esperanto-instruistoj, en kiuj la kursgvidantoj akiru la necesajn pedagogiajn kaj didaktikajn instruojn. Grandparte ili estas dilektantoj: nur kelkaj fariĝas lertaj instruantoj, post memkostaj spertoj kaj eraroj. De tio devenas, ke niaj instrumetodoj plejkaze malfruas duonjarcenton. Laŭ nia scio, nur du personoj aplikas la rektan metodon (t. e. paroloj en Esperanto al la lernantoj ek de la komenco), Prof-ro Canuto kaj S-ro Basso el Genova. Kelkaj malmultaj inter kiuj la subskribanto, enkondukis duonrektan metodon. La aliaj restis al la gramatika sistemo kaj ankoraŭ ne konscias ke lingvo ne vivas en ekzercaj tipaj frazoj (kie kontraŭe vivas la reguloj) sed en kompleta sinsekvo de la penso en literaturaj verkoj. Plie, necesas ke niaj instruistoj estu bonaj apologistoj de la lingvo, ke ili kuraĝigu la lernantojn uzi praktike Esperanton kaj legi la multkoloran esperantan literaturon, ke ili akompanu la novbakiton en la movadan aktivecon.

Ni esperu, ke jam de nun la Esperanto-Katedroj aranĝu superajn, duagradajn kaj triagradajn, kursojn por perfektiĝantoj kaj instruistoj. En ili oni serioze esploru la fakojn antaŭviditajn de la ekzamen-regularo de Itala Esperanto-Instituto, nome: historio de Esperanto kaj de ĝia literaturo. Se tion ni faros en la monatoj kiuj restas ĝis la Universala Kongreso, ni povos en aŭtuno ĝui la fruktojn de la grandega propagando per multaj sukcesaj kursoj.

Jen, skize, kelkaj problemoj el la multaj kiuj atendas solvon de la Kvina Nacia Kunveno en Bolonjo.

GIAN CARLO FIGHIERA

SCIENCA REVUO

Hodiaŭ ni deziras atentigi niajn legantojn pri la supremenciita revuo, kiu bedaŭrinde, ne estas konata tra la itala esperantistaro.

Fakte, en Italujo ĝi havas malpli ol deko da abonantoj, kaj ni devas rimarkigi ke « Scienca Revuo » estas, en nia movado, unu el la plej gravaj publikaĵoj: nome, ĝi estas la sola ligilo inter la esperantistaj sciencistoj de la mondo kaj la sola lertega forumo pri terminologiaj diskutoj kaj problemoj. Sed la graveco de « Scienca Revuo » ne estas nur kultura sed ankaŭ propaganda, ĉar pruvas al ne-esperantista publiko la taŭgecon de esperanto kiel scienca lingvo. Ni mem spertis ke la montrado de tiu serioza revuo al sciencaj organizaĵoj estas la plej efikeca propagando pri internacia lingvo. Ni ne devas forgesi ke nia movado estas ĉefege *kultura*, kaj la kulturon naskigas la libroj kaj publikaĵoj.

Nuntempe, « Scienca Revuo » atingas kvinjaran aĝon, kaj ni deziras sciigi ke ek de unua numero, la eldonisto, S-ro Muussees, subtenis finance la revuon ĉar la malmultaj abonantoj ne sufiĉis.

Estas riproĉa kaj ĉagrena afero ke revuo tiel bone verkata kaj tiel zorge eldonata havas malpli ol kvincent abonantoj kaj kompreneble tia situacio ne povas eterniĝi. En la lastaj jaroj alia gravega revuo, « Malgranda Revuo » ĉesis la publikadon, pro manko de abonantoj; samo ne devas okazi al alia nia grava revuo kaj do, ni petas ĉiujn grupojn: abonu vian sidejon al tia revuo, tielmaniere viaj anoj povos legi kaj interesiĝi pri tiu revuo kaj nu, emi al nova abono!

Por konigi sian revuon, la redakcio de S. R. sendas al ĉiuj interesuloj provnumerojn kaj vi povas mendi al Scienca Revuo ĉe J. MUUSSES - Purmerend - *Nederlando*.

Notiziario Iske n. 10

LA LETTERATURA SCIENTIFICA IN ESPERANTO

Fin dagli inizi, l'esperanto trovò entusiastiche accoglienze da parte degli scienziati che lo appresero, i quali ne apprezzarono l'alta regolarità e la costruzione logicissima e perfetta.

Dai primi articoli scientifici sulle riviste esperantiste si passò ad opere complete, più impegnative, che spaziarono, in breve, in tutti i campi dello scibile.

Non abbiamo qui lo spazio per elencare le opere scientifiche più importanti, apparse in lingua internazionale e rimandiamo perciò il lettore alla « Bibliografia essenziale » del Marini, che ne elenca in buon numero, sia originali che tradotte.

Vogliamo invece far notare che purtroppo le opere scientifiche in esperanto sono rimaste nella grandissima parte sconosciute alla scienza *non esperantista*, che, sfortunatamente, è incline a ritenere l'esperanto una lingua inadatta ad esprimere in modo chiaro e preciso concetti scientifici complessi.

